

# INTERNI

estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,  
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 237

Januaro, 2006

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto  
Stevens Norvell — kompostisto  
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto  
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson  
329 Poplar Drive  
Dartmouth, Nova Scotia  
KANADO B2W 4K8  
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:  
Reni Porter  
71 RidgeValley Road  
Halifax, Nova Scotia  
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado estas \$8, por Usono \$12, kaj por aliaj landoj estas \$20

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

## PONTOJ

Halifakso estas provinca ĉefurbo kun granda atlantika haveno kaj du pontoj, kiuj ligas la malnovan halifaksan flankon kun la malnova apuda urbo de Dartmouth, jam delonge parto de la metropola regiono de Halifakso dank' al la pontoj. Ambaŭ estas pendopontoj. La unuan oni malfermis la 2-an de aprilo 1955 post tri-jara konstruo, kaj la duan (la "novan") oni konstruis antaŭ 35 jaroj kaj malfermis la 10-an de julio 1970. La dua estas pli granda kaj pli larĝa ol la unua; ĝi havas kvar vojojn, du por ĉiu direkto. Jam antaŭ kelkaj jaroj oni renovigis la "malnovan" ponton; oni kreis tri vojojn el du, kaj pendis vojetojn el la eksteraj flankoj de la ponto, unu por piedirantoj kaj la alia por biciklistoj. Tiun rekonstruon oni finis en 1999. Oni ne rajtas piediri aŭ bicikli sur la pli nova ponto.



Halifaksa haveno kun pramboato. Oni vidas en la fono la Ponton MacDonald. Dank' al Halifax Regional Municipality.

Oni devas agnoski la gravecon de ambaŭ pontoj por ebligi pli facilan aliron por halifaksanoj al ambaŭ flankoj de la haveno. Facila interŝanĝo de trafiko ne eblus sen ili, kaj ankaŭ facila, moderna vivo. Antaŭ ol oni konstruis la pontojn, la vivnivele estis malpli rapida, malpli evoluinta, kaj oni devis fidi al pramboatoj por transiri la havenon. Pro urĝa bezono por pli facila komerco inter la urboj, oni finfine konstruis la unuan ponton, nomitan la Macdonald (pr.

makDANeld) ponto. Post 15 jaroj multege helpis la dua, kiun oni nomis la MacKay (pr. maKEJ) ponto. Nuntage, oni ne povas imagi la urbon sen la pontoj. Dum la jaro 2004, veturiloj trapasis la du pontojn proksimume 31,7 milionfoje. La 23-an de novembro 2005 oni festis la miliardan transveturon de la pontoj kiam oni donacis premion al paro, kiu veturis al Halifakso en sia aŭto trans la „nova” ponto.

Dum la pasinta somero oni festis la 50-jariĝon de la unua ponto kun ceremonio kaj oportuno por libere promeni la 1,3 kilometrojn de la vojo kie kutime cirkulas la trafiko. Dum la pasinta monato oni ankaŭ festis la laboristojn, kiuj konstruis la du pontojn. La 5-an de decembro 2005, oni malvualis statuon "La fer-laboristo" (farita el kupro de la artisto Peter Bustin) starantan sur dekliva fera trabo. La statuo situas ĉe la dartmoŭta flanko de la malnova ponto, kaj ĉiutage mi povas vidi ĝin kiam mi transiras tiun ponton. Mi kaj mia edzino loĝas transe de la haveno de la malnova ĉefurbo, kie ni ambaŭ laboras. Sen la pontoj, niaj vojaĝoj al la laborejoj estus proksimume 19 kilometrojn pli longaj pro la fakto ke granda baseno troviĝas ĉe la fino de la haveno.

Mi metafore demandas al mi, ĉu oni finfine sentos la neceson por uzi nian karan pontlingvon por pli faciligi la internacian vivadon? Nia lingva ponto traktas ambaŭ flankojn de lingva aparteco plej egale. Kiel pontoj trans la haveno, ĉiuj vojoj kondukas egale larĝe de unu flanko ĝis la alia. Ĉiu uzanto pagas la saman prezon. Sed nacia pontlingvo malsamas. Ĝi estas libere alirebla al la denaskuloj, sed kondukas al malpli granda grupo da kleruloj ĉe la alia flanko, kiuj ne havas la saman alireblecon. Alivorte, la kosto por uzi la nacian pontlingvon ne estas egala al ĉiuj. La denaskaj parolantoj pagas preskaŭ nenion, sed la alilingvanoj pagas pli altan koston, ofte tro altan por povi elteni la elspezon.

Efektive, ponto por kunligi la diversajn flankojn de iu ajn lingva aparteco jam ekzistas. Oni jam delonge finkonstruis ĝin - nun oni ja devas nur elekti uzi ĝin.

— Bob Williamson

## NOVA VOJMONTRILO AL MOVADA PASINTECO

En Vilno dum la 90-a UK (2005) oni enmanigis al mi tute freŝan verkon *Historio De Esperanto*. Temas pri 128-paĝa eldonaĵo, kies kolora kovrilo kun interesa foto tuj kaptis mian atenton. Pasinteco de nia movado signifas al mi malluman krepuskon, kvankam mi jam pli frue sekvis paŝojn de Edmond Privat, Marjorie Boulton, Adam Zakrzewski, Wendy Heller kaj Zofia Banet-Fornalowa. La verkinto Aleksander Korĵenkov montris al mi novan vojon, kiu estas facile sekvebla, kvankam mia kadukiĝanta memoro jam iomete komencis bremsi kaj kateni efikan agadon.

Komence oni kompreneble prezentas d-ron L.L. Zamenhof, la iniciatoron de Esperanto. Apartan atenton la verkisto donas al ekstermovadaj detaloj, por ke legantoj ekkonu el tiu flanko la vivon kaj la mondkoncepton de la kreinto de la internacia lingvo Esperanto. Multaj leterfragmentoj trafe ilustras la rakontadon. La teksto havas amase detalajn informojn kaj ciferojn. Tamen estis eble progresi kun ili kaj ne perdi la ruĝan fadenon de la verko. Ni scias, ke ĉiam minacas danĝera ebleco kvazaŭ droni en oceano de tro multaj etaj scieroj. Eĉ nefakula leganto sukcese navigacias sur niamovada historia maro dank' al konciza, sed ankaŭ riĉe viva plumuzado de Aleksander Korĵenkov.

En la ĉapitro "Antaŭ la internaciaj institucioj" malfermiĝas multflanka bildo pri agado de Ligo de Nacioj koncerne la lingvajn problemojn. Asista ĝenerala sekretario de LN Inazo Nitobe partoprenis la 13-an Universalan Kongreson en Prago (1921) kaj post ĝi li verkis raporton "La lingva problemo kaj la Ligo de Nacioj", en kiu li pozitive taksis Esperanton kaj nomis ĝin 'motoro de internacia demokratio'. Oni favore rilatis al Esperanto en tiu ĉi mondorganizaĵo. Kompreneble kelkaj deputitoj subtenis la anglan kaj iuj usonanoj proponis revivigi la latinan. Pliposte francoj sisteme kaj forte komencis agi kontraŭ la Zamenhova lingvo. En septembro 1922 oni voĉdonis (26 por kaj 2 kontraŭ) pri favora raporto por Esperanto. Tiu oficialigo de la valoroj de nia lingvo fare de la plej prestiĝa internacia organizo estis grava atingo, kvankam ĝi ne havis praktikan daŭrigon.

Eblas ĉi tie mencii nur iujn erojn el la verko, kiu meritas nian atenton. Aleksander Korĵenkov sukcesis kompili etan giganton, kiu taŭgas por spertuloj kaj novicoj. Klarigaj notoj sur la lastaj paĝoj pliprofundigas legadon. Same biografietoj certe utilas al ĉiuj, kiuj studas pri fazoj de nia movado. Ni povas facile kontroli kaj relegi informojn kiuj koncernas niajn movadajn korifeojn. La lasta ĉapitro titoliĝas "Post la falo de la Berlina muro". Tio signifas, ke la aŭtoro traktas okazintaĵojn ĝis la hodiaŭa tago. Kompreneble oni povas tion fari nur supraĵe, sed mi ĝojas pro la verkista kuraĝo plenumi deziron de iuj movadanoj. Konata verko *Esperanto En Perspektivo* (1974) servas fakulojn kaj entuziasmulojn. Ĝi estas kvazaŭ peza briko kun 844 paĝoj - en teko ne sufiĉas loko por ĝi. Por ĉiuj, la tre taŭga *Historio De Esperanto* estas kunpreninda kaj kunprenebla. En mia dokumentujo la produkto de Aleksander Korĵenkov havas privilegiitan lokon kaj mi utiligas ĝian admirindan enhavon kaj por plezuro kaj por studado. Dankon kaj gratulon, Aleksandro!

— Jorma Ahomäki  
Turku, Finnlando (Septembro 2005)

## RADIO VERDA

RADIO VERDA estas pioniro en produktado de sendependa, internacia, plene interreta aŭdprogramaro en Esperanto. Vin unue salutis *la voĉo de Esperantujo* en 1998.

En Radio Verda vi aŭdos plej diversajn temojn kaj pensojn. RV celas aŭdigi interesajn, mallongajn kaj ofte ŝanĝiĝantajn programojn al esperantlingvaj retanoj de la tuta mondo. RV malformalas kaj rifuzas promesi specifan aperritmon. Oni kalkulas je viaj kontribuoj!

Venu por kunpioniri. RV esploras podkaston\* teĥnologion per komuna ĝuado de ĉiaj pensoj kaj temoj el nia Verda komunumo.

Vizitu kun Karlina kaj Arono en Vankuvero, Kanado ĉe <http://radioverda.com>

\*podkasti = brodkasti (radio-disendi) per son-dosiero akirita el la interreto. Oni povas aŭskulti la dosieron per persona aŭdilo kiam ajn oni deziras.

## La Policisto Volas Lerni Esperanton

La 1993-a kongreso de ELNA (Esperanto-Ligo de Norda Ameriko) okazis ĉe la tereno de Hartforda Universitato (Connecticut, Usono). Ĝin organizis samideanoj de najbara Kanado, sub gvido de konata kebekia Esperantista aktivulo Normando Fleury. Al mi ŝajnis, ke universitata polico iom suspekteme rigardis konferencanojn, kiuj parolis nek la anglan, nek la francan lingvojn, sed iun strangan, similan al itala kaj hispana.

Unufoje sur ŝoseo, kiam Normand ŝoforis sian aŭton, policano ordonis al li halti. Normando, eksterlandano, ne hastis obei; renkontiĝo kun polico en fremda lando promesis al li nenion bonan. Despli, ke li ne parolis la anglan.

Tamen ni haltis. La policano alproksimiĝis kaj observante algluaĵojn sur nia aŭto "Lernu Esperanton", "Esperanto estas lingvo de paco", demandis: "Kie mi povus studi vian lingvon?"

Normando ekridetis kaj donis al li sian adres-karton.

Trovita en interesa Odesa retloko: <http://www.esperantouniverse.com>

*Krokodiloj ridetas* — Anekdotoj de Deribaso